FN PER ANC 47

N°239 SEPTEMBRO 2009

# NORMANDA ESPERANTO BULTENO

## ESPERANTO - NORMANDIE

Redaktas :Pierre Lemarchand, 2 les Terres Quemines 76113 Hautot sur Seine. Tel. 02 35 34 28 78
LEMARCHANDPI@wanadoo.fr
Abon-kotizoj : 8 Eŭroj . Esperanto - Normandie. C.C.P. 283.40.H Rouen.

esperanto Normandie

## Hérouville-Saint-Clair (14200)
## Dimanĉon la 11an de oktobro 2009
## « Maison des Associations »

Ni kunvenos en la
***« Maison des Associations »***
***10/18 quartier du Grand Parc,***
***14200 Hérouville-Saint-Clair,***
***dimanĉon la 11an de oktobro***
***de 10h30 ĝis la 16h00.***

Ĉiu partoprenanto alportu siajn proprajn manĝaĵojn. (Nia asocio pagos la trinkaĵojn kaj kafon !)

***Tagordo :***

- Kio nova en la grupoj kaj unuopaj agadoj.
- Financa punkto.
- La bulteno.
- Estraro kaj estraranoj.
- Kio ligas nin ?
- Kion ni faru kune ?
- Proponoj por 2010.
- Prelegoj proponataj de Herouville Esperanto : - Rusa kantgrupeto (Tikhvino), januare, - Prelegturneo de Kimie Markarian pri Sorobano, printempe.

Tiuj kiuj intencas partopreni tiun kunvenon, vi bonvolu sendi al **Yves NICOLAS, 14 place Laënnec 14000 Caen** konfirmon perletere, aŭ telefone (*prefere vespere*) **: 06.12.34.13.39.**

Le dimanche 11 octobre 2009 réunion de notre association « Esperanto - Normandie » dans la Maison des Associations de Hérouville Saint Clair Calvados. 10h30 à 16h00. Chaque participant apportera son repas du midi. (Notre association vous offrira les boissons et les cafés !) Vous trouverez un plan sur la page 2, pour atteindre facilement la salle de réunion.

Ordre du jour :

- Quoi de neuf dans les groupes, et activités individuelles.
- Point financier.
- Le bulletin.
- Bureau de l'association.
- Qu'est-ce qui nous réunit ?
- Que faire ensemble ?
- Propositions pour 2010.

Veuillez confirmer votre participation à cette réunion en écrivant à **Yves NICOLAS, 14 place Laënnec, 14000 CAEN** ou en lui téléphonant (de préférence le soir) au : **06.12.34.13.39.**

Vi trovos mapon sur la 2a paĝo por facile trovi la kunvenejon


***En tiu numero :***


| | |
|---|---|
| Kunveno en Hérouville. | 2 |
| Aforismoj. | 2 |
| La Cikonio Pola travivis... | 3 |
| Apudborda navigado sur Sejno. | 4 |
| Nia bulteno tra jaroj. 2.. | 5 |
| Kvina listo de kotizantoj. | 6 |
| Bjalistoka poŝtkarto. Kongresoj 2010. | 6 |

**Maison des Associations**
**10/18 quartier du Grand Parc.**
**14200 Hérouville Saint Clair.**




**Poŝtmarko el Popola Ĉinio. 1987 julio. 100a datreveno de Esperanto.**




Se vi konas Internet-adreson de geesperantistoj kiuj ŝatus ricevi nian modestan bultenon, vi bonvolu ĝin sendi al ni, aŭ instigu ilin sendi al ni la informon. Se via Internet-adreso ŝanĝus, ne forgesu sendi al ni la novan. Antaŭdankon.

LEMARCHANDPI@wanadoo.fr

## AFORISMOJ :

- Ne koleriĝu kontraŭ speguloj se via facio malbelas. *(Rusa proverbo).*
- Se raŭpo ne metamorfozas, ĝi neniam estos papilio.
- Se vi ne agas hodiaŭ, morgaŭ similos je hieraŭ.
- Ne vin venĝu kontraŭ estanteco, detruante estontecon.
- Ne farigu vian estontecon teruran, pro tio ke vi juĝas malagrablan vian nunon.
- Ne juĝu oceanon laŭ la ŝaŭmo de ĝiaj bordoj.
- Ne juĝu principojn laŭ ilia foja aplikado.
- Katastrofoj liberigas la spiriton de malgravaĵoj.
- La dikeco de ramparo malpli gravas ol la volo ĝin defendi. *(Thucydide 1-1).*
- Stulteco kaj masinformiloj pariĝas, kaj generas Opinion.
- Silento de pantofloj generas botbruojn.
- Bufoj ne mordas, ĉu tial ni da ili metu en la kalsonon ?
- Kiom da faktoj endas ne koni por agi ! *(Paul Valéry).*

***Henri ROUSSEAU***

Nia eksprezidanto kaj amiko **Sébastien ERHARD** informas nin ke ekde oktobro li translokiĝos en **Bruxelles**, kaj restados verŝajne dum du jaroj por tie studi ĉe teatro-lernejo.

Sukcesan studperiodon Sébastien !

Lia retadreso ĉiam estas : hodos@free.fr

Pli ol 200 numeroj de **LAŬTE** jam aperis !
Kontribuintoj el multaj landoj, interesplenaj legaĵoj :
**Cercle Amical Espérantiste de l'Agenais**
**47470 BEAUVILLE**

Abono por 6 numeroj jare : **15 €** Poŝtkonto :
Cercle amical espérantiste Bordeaux 3 371 74 M




**SAT-BROŜURSERVO** : pli ol 75 titoloj + 20 prilingvaj broŝuroj por varbi, inici, lerni, progresi, instrui ....
Ĉe la sama adreso :
Esperanto FR-47470 BEAUVILLE.

Cercle Amical espérantiste de l'Agenais :
sidejo, renkontiĝejo : Esperanto Cargue Sac
FR-47470 BEAUVILLE. Tel. : 05 53 95 40 26
Retadreso : renee.chassard@wanadoo.fr

## La cikonio Pola travivis eksterordinaran someron.

Saluton. Mi nomiĝas Pola, nomo tre ofta por polaj cikonioj. Ĉiusomere, ni migras al tiu lando kies loĝantoj bone akceptas nin. En la vilaĝoj, kun belaj lignaj domoj, ili starigas altajn fostojn kie ni konstruas grandajn nestojn. Ni sentime akompanas la homojn kiuj laboras en la kamparo. Antaù tre longe, miaj praavoj elektis la regionon de Bjalistoko por naski siajn idojn. Ni ŝatas tiean glatan naturon kun multaj arbaroj kaj marĉoj.

Ĉi-jare, mi iom miris ĉar ne nur birdoj amase migris al Bjalistoko. Aùdeblis kiel kutime la pola, belrusa kaj litova lingvoj - la urbo tre proksimas trilandan landlimon- sed ankaù alia lingvo kiun ĝis nun mi aùdis nek en Pollando, nek en Turkio kie mi vintre restadas. Homoj kiuj parolas ĝin invadis tiun belan urbon dum unu semajno. Surstrate, facile rekoneblaj ili estis, dank'al verda ŝildeto kiun ili fiere portis ĉirkaù sia kolo. Ili multe frekventis la trinkejojn kaj restoraciojn, ĉefe tiun grandan en la urbocentro kiu nomiĝas « Esperanto », kaj duope, triope, kvinope, pilgrimis al pluraj enurbaj monumentoj kiuj honorigas iun urbanon kun barbeto kaj malgrandaj okulvitroj : pentraĵo sur lia naskiĝdomo, skulptaĵo sur placo ; eĉ kulturcentro ĵus inaùgirita, kaj hospitalo portas lian nomon. Tie li naskiĝis antaù 150 jaroj, kaj restas tre grava homo en la memoro de Bjalistoko.

Por akcepti tiujn migrantojn, la lokaj instancoj florigis la urbon per miloj da verdaj flagetoj kiuj flirtis en la stacidomo kaj sur ĉiu stratlampo. Multaj kulturaj ejoj (urba biblioteko kaj spektaklejoj) estis je la dispono de tiuj migrantoj por prezenti teatraĵojn aù por serioze diskuti pri historio de la literaturo de tiu internacia lingvo kun pollingvaj verkistoj. Mi informiĝis : tiuj homoj uzas komunan lingvon, kvankam ili venas de ĉiuj partoj de la mondo. Kial do ili fieras pri tiu celo atingita ? Ni, cikonioj, de ĉiam uzas la saman lingvon kvankam niaj naskiĝlokoj tre malsamas kaj ni ne bezonas fanfaroni ĉiu-jare dum unu semajno por glori tion !


Pli ol 1800 homoj de sesdeko da landoj venis por kongresi en bela teĥnika instituto kun multaj taùgaj ĉambroj por grandaj kaj malgrandaj kunvenoj. Kial do ili bezonas babili tre serioze pri tiom da malsamaj temoj ? Kapti ranojn en la apudaj kampoj ne estas sufiĉa plezuro por ili ? Ne, videble ili preferis ĉeesti kongresan malfermon kun la urbestro kiu longe intervenis en esperanto, aù aùskulti tre diversajn kantojn. Ili preferis viziti la budojn de mirinde multaj asocioj (politikaj, religiaj, geja, radioamatora, edukaj, ktp). Por ne preterpasi aranĝon, ili senĉese trafoliumis la kongreslibron kie la programo estis tre bone prezentita. Lerni la polan, informiĝi pri sorobano aù Oomoto, kanti, aùskulti prelegantojn pri la tre interesa historio de Pollando, trapasi ekzamenojn, pripensi la kongresan temon « krei pacan ponton inter la popoloj. Zamenhof hodiaù », ktp.

Ktp, ktp, jes ja, sed nenio pri la cikonioj. Nekredeble ! Ni havus multon por instrui al tiu verda popolo : kiel ni uzas la varmajn ventojn por senlace flugi dum centoj da kilometroj, kiel ni portas la homajn bebojn en granda tuko, kaj multajn aliajn aferojn.

Mi rimarkis, inter ili 4 homojn de Normandio, regiono kie loĝas ankaù kelkaj cikonioj : Christian Levêque, Odile Masseron, Claude Ferrand kaj Yves Nicolas, sed la programo estis tiom granda ke ili tre malofte sukcesis renkontiĝi.

Mi aùdis, ke la venonta kongreso de UEA okazos en Kubo. Ĉu tie ankaù nestas cikonioj ?

***Pola, la cikonio.***




94-a Universala Kongreso de Esperanto
25.07-1.08.2009
Bjalistoko, Pollando

## Cabotage en Seine

Entre l'embouchure de la Seine et Rouen, il existe une façon délicieuse d'enjamber le fleuve : les bacs. En augmentant leurs fréquences, le département, accroît aussi les possibilités de découverte.
D'une rive à l'autre, la balade au fil de l'eau.
Pendant des lustres, les bacs étaient les seuls moyens de traverser le grand fleuve. Songez par exemple qu'au XVIIIe, on comptait 19 bacs entre Rouen et Le Havre. Secondant aujourd'hui les 3 ponts majestueux ( Normandie, Tancarville, Brotonne) ils sont huit à permettre à des milliers d'habitants de la région de se rendre chaque jour sur leur lieu de travail. Pour d'autres, ils sont l'occasion de s'adonner quelques minutes aux joies de la navigation fluviale et représentent un moyen original et ludique de se rendre d'un point à un autre. Et, pourquoi pas, pour faire quelques découvertes.
Par exemple, à proximité trônent quelques-uns des plus beaux spécimens de la Route des Abbayes Normandes.
Les abbayes de Jumièges, de Saint-Wandrille ou de Saint-Martin-de-Boscherville ne sont en fait qu'à quelques minutes seulement d'un point de passage. Sur la rive gauche, à Notre-Dame-de-Bliquetuit, c'est la Maison du Parc Naturel Régional des Boucles de la Seine Normande qui vous ouvre ses portes. Pour vous y rendre, vous traverserez un verger conservatoire et vous découvrirez dans cette ancienne ferme du XVIIe siècle toutes les actions du Parc en faveur de la protection de l'écosystème et de la mise en valeur du patrimoine naturel local.
Située à un endroit stratégique, la Maison constitue également le point de départ de la Route des Fruits et la Route des Chaumières. Ces deux itinéraires se complètent de façon parfaite pour vous permettre de plonger au cœur du pays normand et du savoir-faire de ses habitants.
Tandis que la première vous mènera à l'est vers Jumièges et Duclair, la seconde par Vatteville-la-Rue, Aizier et Vieux-Port gagne à l'ouest les confins du Marais Vernier. Pour réussir pleinement vos mini-croisières, pensez à noter les horaires de chacun des bacs rive droite ou rive gauche.
Bonne promenade !
8 bacs pour une Seine :
* Quillebeuf-sur-Seine/Port-Jérôme
* Yainville/Heurteauville
* Jumièges/Heurteauville
* Le Mesnil-sous-Jumièges/Yville
* Duclair/Berville
* Sahurs/La Bouille
* Val de la Haye/Petit-Couronne
* Dieppedalle/Le Grand-Quevilly

## Apudborda navigado sur Sejno

Inter la Sejna enfluo kaj Rueno, estas rava maniero, transpasi la riveregon : la pramoj. Grandigante ilian oftecojn, la departemento ankaŭgrandigas la eblecojn de la malkovro. De bordo al alia, la promenado laŭflue :
De longe, la pramoj estis la nuraj rimedoj por trairi la grandan riveregon. Konsideru, ekzemple, ke, ĝis la 18-a jarcento estis 19 pramoj tra Sejnon, inter Rueno kaj Havro. Krom, hodiaŭ, tri majestaj pontoj : (Normandie, Tancarville, Brotonne ), ok pramoj permesas al miloj da loĝantoj iri ĉiutage al la labora loko.
Pri aliaj, estas okazo sin fordoni dum kelkaj minutoj al la ĝojo de la riverveturado. Estas ankaŭ originala luda ebleco iri de punkto al alia. kaj, kial ne por malkovri ion ? Ekzemple, apude troviĝas kelkaj el la plej belaj specimenoj de la Vojo de la Abatejoj.
La abatetoj en Jumièges, Saint-Wandrille aŭ Saint-Martin-de-Boscherville estas vere nur je kelkaj minutoj de transirejo. Sur la maldekstra bordo, en Notre-Dame-de-Bliquetuit, troviĝas la Domo de la Natura Regiona Parko de la kurbaĵoj de Normanda Sejno, kiu malfermas al vi siajn pordojn. Por iri tien, vi trairos konservan fruktarbejon, kaj vi diskovros en tiu malnova farmodomo ( XVII-a jarcento) ĉiujn agadojn de la Parko por la protektado de la ekosistemo kaj la valorigo de la loka natura hereda posedaĵo.
La domo, situanta je strategia loko estas ankaŭ la deirpunkto de la Vojo de la Fruktoj, kaj de la Vojo de la Pajlategmentaj Domoj.
Tiuj irotaj vojoj perfekte kompletigas kaj ebligas al vi profunde vivi en la koro de la normanda lando kaj konatiĝi kun la kapablo de ĝiaj enloĝantoj. La unua irota vojo iras oriente al Jumièges kaj Duclair, la dua, tra Vatteville-la-Rue, Aizier et Vieux-Port, okcidente, baldaŭ atingos la limojn de "Marais Vernier".
Por tute ĝui viajn etajn krozadojn, bonvolu noti la horarojn de ĉiu pramo, ĉe dekstra aŭ maldekstra bordo. Bonan promenadon ! 8 pramoj por unu Sejno.

** Eltirajo de "Vojcelo Seine-Maritime" la magazino de la Departementa Komitato de la Turismo en Seine-Maritime n°4 - Aprilo Junio 2005.*

Tradukita esperantlinge de ***"Havra Esperantista Grupo"*** ***http://esperanto-lehavre.org***

| | | |
|---|---|---|
| n° **33**a Aprilo 1937 | 4 paĝa | Kurso de Sro Dubuisson ĉe Radio Normandie, dufoje monate je 22 h. |
| n° **34**a Majo 1937 | 6 paĝa | 14a kongreso en Le Havre : 18an de aprilo 1937. - Grupoj en Le Havre, Rouen, Sotteville, Elbeuf, Sanvic, Lisieux, Vire, Les Andelys, Cherbourg.<br>245 membroj kotizis (35 aktivaj membroj). Prezidanto : Sro Roro Pissaro (Les Andelys), Fino Tinel (Les Andelys) vicprez. + sekretariino. Sro Jouis : kasisto.<br>Revuo en la salono La Lyre Havraise « Je vous Zamenhof Havre ». |
| n° **35**a Junio 1937 | 4 paĝa | Sro Roro Pissaro skribas dirante : « Mi ne povas esti prezidanto de la Federacio : mi ne estas SFPE-ano, kaj ne estas membro de ia grupo », do ne plu estas prezidanto de la Federacio. |
| n° **36**a Julio 1937 | 4 paĝa | Pikniko en Caudebec en Caux : 70 personoj. Ekskurso en Orival : 25 personoj. |
| n° **39**a Marto 1938 | 6 paĝa | Ne okazos kongreso dum 1938, nur Federacia Tago en Rouen la 22an de majo. |
| n° **41**a Junio 1938 | 6 paĝa | Nova grupo en Oissel. - Federacia tago en Rouen la 22an de majo.<br>Rondvojaĝo de R.P. Kao el Ĉinio. Por 1937 : aliĝis al la Federacio 197 membroj. |
| n° **42**a Julio - Aŭg. Sep. | 4 paĝa | Pikniko en La Bouille : 20 partoprenantoj. |
| n° **44**a Januaro 1939 | 4 paĝa | Por 1938 aliĝis 145 personoj : simplaj membroj : 125. Membro kun jarlibro : 14. Abonanto : 4. Heroldo : 1. Dumviva : 1. |
| n° **45**a Februaro Marto 1939 | 8 paĝa | Je la 26a de februaro pagis : 18 membroj el Rouen, 17 el Elbeuf, 13 el Les Andelys, 14 Sotteville, 2 L'Aigle, 2 Vire, 1 po Fécamp, St Martin de Bienfaite, Aumale, St Nicolas d'Aliermont, Caen = 61 membroj. |
| n° **46**a ApriloMajo 1939 | 4 paĝa | Federacia kunveno en Sotteville la 21an de majo 1939. |
| n° **47**a Junio 1939 | 6 paĝa | Prezidanto : Robin (Sotteville), Sekretariino : Sino Gillette. Kasisto : Sro Strub. Bultenisto : Sro Parrington. De post 1937 ne estis Prezidanto. |
| n° **48**a Aŭgusto 1939 | 6 paĝa | Pikniko en La Bouille : 25an de junio 1939 : 40 personoj + 15 posttagmeze. |
| n° **50**a Februaro Marto 1940. | 4 paĝa | Kvina numero de « Dum la Milit' » eldonita de Sro Saget el Elbeuf. Sro Jouis prezidanto de la Ruena Grupo depost 1931.<br>130 membroj aliĝis al la Federacio por 1940. |
| | ***DUA MONDMILITO*** | |
| Sekretaria Folio 31an de Julio 1946 | | Sendita de Sro Dieudegard. - Ekskurso al Fécamp (Gvidanto Sro Cloche) la 4an de aŭgusto.<br>10a ĝis 18a de aŭgusto okazis Esperantista Semajno en Junulgastejo « Stepa Domo » en St Jean de la Neuville, apud Bolbec : « La partoprenantoj kunportu sukeron, pankuponojn kaj manĝilaron... ». « Sro Dupuis zorgos pri veturado ĝis Fécamp per ŝarĝaŭtomobilo kovrita kaj havanta sidlokojn. » |
| Sekretaria Folio 31an de Julio 1946 | | Sendita de Sro Buisson. - Sliparo finstarigita (Li skribis pri ĝi en la 3a Federacia Bulteno.) kun pli ol 200 slipoj. |
| Bulteno n°**4a** Federacio de la Normanda Regiono | 9 paĝa | La 15a Federacia Kongreso okazis en Rouen (12an de majo 1946) : 36 membroj. Bultenisto Sro Dieudegard. - Starigo de gazetar-servo (Fino Loison) :kolektiva cirkulanta abono. (Maksimuma nombro 6 aŭ 8.).<br>14a de julio : Pikniko organizita de la Elbeuf-grupo en Robert le Diable. Ekskurso al Les Andelys la 1an de Septembro : 40 partoprenantoj. |
| n° **5**a Septembro Oktobro 1946<br>Normanda Esperantista Federacio | 9 paĝa | Artikolo de Sro Dieudegard : « Kelkaj Samideanoj skribis al mi : ĉu la Federacio estas nur UFEa aŭ ĉiutendenca organizo ? ».<br>Prezidanto: Sro Jouis. Sekretario : Sro Buisson. Bultenisto : Sro Dieudegard. Kasistino : Fino Loison. - 89 membroj pagis kotizon por 1946. |
| n° **6**a Novembro Decembro 1946 | 8 paĝa | Artikolo de Sro Buisson : « Dum la proksima kongreso, mi proponos ke Normanda Esperantista Federacio fariĝu sendependa asocio rilate UFE, IEL, SAT... |
| n° **7**a Januaro Februaro 1947 | 10 paĝa | 11an de majo :Kongreso en Evreux. - Prezidanto, Sekretario, Kasisto, Propagantisto, Bultenisto, Gazetservo. |

Daŭrigota...

# ESPERANTO - NORMANDIE

*__Une ouverture sur tous les peuples, toutes les cultures__*

**17 - 24 julio 2010**

95a Universala Kongreso de U.E.A. en Havano - KUBO.

## KVINa listo de kotizintoj por 2009

Rigardu ĉu via nomo estas en ĉi-suba **KVINA** listo : *Ge-Sinjoroj* :

DUBUC, *DUFOSSE*, DEFRANCE, *LEVESQUE*, LEMELTIER, *ROUSSEAU*, ROUSSEAU J.

Faru vian ĉekon profite de __ESPERANTO-NORMANDIE CCP 283 40 H ROUEN__ __Abon-kotizo por 2009 : 8 Eŭroj__, kaj sendu ĝin al la kasisto : .

Pierre Lemarchand, 2 Résidence Les Terres Quemines. 76113 Hautot sur Seine.

**3 - 6 aprilo 2010**

SAT-Amikaro kongresos ĉe la San-Briega Golfeto.

(*Baie de Saint-Brieuc*)

**24 - 31 julio 2010 :** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo organizas la 66an « Internacia Junulara Kongreso (IJK) » en Los Cocos KUBO, tuj post la Universala Kongreso de U.E.A.

**Si vous désirez recevoir gratuitement les prochains bulletins en couleur,par Internet, selon le format « PDF », envoyez-nous votre adresse par courriel à : LEMARCHANDPI@wanadoo.fr**

"Kiu tro ripozas, baldaŭ almozas." **(LLZ)**

### Almozulo

Riĉulo admonas ĝenantan almozulon sojle de la pordo:

"Vi denove venis ? Hieraŭ vi diris, ke vi estas bankrotinta komercisto. Kial do hodiaŭ vi diras, ke vi estas bankrotinta muzikisto?"

Almozulo: "Ĉio-ĉi estas vero. Nuntempe, dum malfacilaj tempoj, ne eblas travivi per nur unu profesio."


*(dankon al Nina el Pollando)*

Je pentekosto : **21 - 24 majo 2010**

Esperanto France (U.F.E.) kongresos kun Germana E° Asocio (G.E.A.)

En Kaiserslautern, Germanio.

esperanto *Normandie*




Pola poŝtkarto el Bjalistoko, sendita dum la 94a Universala Kongreso de U.E.A.